

Lietuvos Žvaigždė

# LITOVA STELO

---

---

LIETUVOS ESPERANTO SAJUNGOS ORGANAS

ORGANO DE LITOVA ESPERANTO — ASOCIO

---

---

*Bonan kaj prosperan*

*Novan 1939 Jaron*

*deziras al tutmonda esperantistaro*

*Litova Esperanto-Asocio  
kaj „Litova Stelo“*

**6 (24) Nr.**

**Novembro - Decembro**

---

---

**Kaunas,**

**1938**



## LITOVA STELO

ELDONAS LITOVA ESPERANTO-ASOCIO, KAUNAS, ŽEMAIČIŲ 15.

Jarabono 3 lidoj (50 usonaj cendoj). Eksterlande abonebla en ĉiu poŝtoŝeĵejo.

Senpage al ĉiu, kiu tradukos ion el ĝi kaj aperigos en naci-lingvaj gazetoj almenaŭ unufoje. Oni sendu eltranĉaĵon al la redakcio.

Anoncoj: paĝo 10 lidoj, duonpaĝo 5 lid., kvaronpaĝo 2,5 lidoj. Anoncetoj (ĝis 10 vortoj) 1 lido aŭ 2 respondkuponoj. Por membroj de LEA 3 anoncetoj, por eksterlandanoj 1 anonceto senpage.

Ĉion sendu al LITOVA ESPERANTO - ASOCIO, ŽEMAIČIŲ G. 15,

KAUNAS, LITOVUJO

---

### AL REDAKCIO DE „POLA ESPERANTISTO.“

Via propono de amikeco ĝojigas nin. Litovoj havas inter la polaj esperantistoj kaj neesperantistoj multajn amikojn, tamen oni ja neniam povas havi tro multe da ili. Ni precipe ŝatas *sinceran* amikecon (ne laŭ ies ordono), nepre akompanitan de klara kompreno, ke la amikecon oni estigas ne per la forigo de prefikso „mal“ antaŭ tiu vorto, sed per la forigo de *kaŭzoj*, kiuj malhelpas la amikiĝon de ambaŭ popoloj.

La redakcio.

---

### TUJ ABONU

#### „LITOVAN STELON“ POR 1939 JARO

La unuaj abonantoj ricevos valorajn premiojn.

La membroj de LEA ne plu ricevos ĝin senpage.

---

### SAMIDEANOJ,

Postulu esperantlingvajn informojn pri Litovujo de litovaj konsulejoj kaj senditejoj en viaj landoj.

Postulante vi subtenos nian aferon enlande, ĉar la ministerio estos spertinta pri uzebleco de Esperanto por propagandaj celoj, kaj vi mem profitos ricevante senpage belajn kaj valorajn librojn.

### BALTLANDAJ GEESPERANTISTOJ!

Ŝparu monon por agrabla venontjara vizito al Litovujo, partoprenu jubilean kongreson de litova esperantistaro kaj „Baltan semajnon“ en Kaunas dum Junio.

GRAVA!

Belga stacio I. N. R. - Vlaamsch, ondo 321, 9 m. disaŭdigas la 14 de Decembro je 19 - 19,30 h. Zamenhof-memorigon. Nepre aŭskultu kaj skribu al I. N. R. - Vlaamsch, Eug. Flagey plaats, Brussel, Belgujo.



Lietuvos Žvaizgdė

III periodo IV jaro

# LITOVA STELO

Organo de Litova Esperanto - Asocio

**Nr 6 (24)**

Novembro — Decembro

**1938**



*Latva Statprezidanto D-ro Karlis Ulmanis*



## 20 - JARA JUBILEO DE SENDEPENDA LATVUJO.

Nunjare latva popolo festas la 20-jaran jubileon de sia sendependa ŝtato. La sendependeco de Latvujo estis proklamita la 18-an de Novembro 1918, tamen vere sendependan vivon ĝi povis komenci nur en 1919, post sangaj kaj venkaj bataloj kontraŭ rusaj bolŝevikaj kaj bermontanaj (germane- rusaj monarhistaj) armeoj. Nur post la liberigo de lando komenciĝis la konstruado de nova vivo sur ruinoj. La Mondmilito forte trafis latvan popolon kaj ne nur kaŭzis grandegajn materiajn damaĝojn, sed ankaŭ plimalgrandigis la loĝantaron de 2.552.000 ĝis 1.950.000. Do Latvujo perdis dum la Mondmilito ĉirkaŭ 700.000 da loĝantoj.

La rekonstruo komenciĝis per la terposeda reformo, unu el la plej radikalaj en Eŭropo. 1687479 hektaroj de tero el iama posedajo de grandbienuloj estis dividita je 195.855 terposedaj unuoj, kaj tiamaniere oni faris 66.000 da novaj kamparanaj mastrumadoj, 11.000 pormetiistaj mastrumadoj, 50.000 parcelojn por etposedantoj, 3.000 porfiŝistajn mastrumojn, 2.500 ĝardenojn kaj 46.000 da urboj parceloj. Ĉirkaŭ 60% de ĉiuj mastrumoj estas de 5 ĝis 30 hektaroj. Bienoj, havantoj pli ol 100 h., faras nur 0,44% de ĉiuj mastrumoj.

Ankaŭ la industrio poiome kuracis la militvundojn. La nombro de industrilaboristoj nun superas 120.000. En Latvujo ekzistas pli ol 5.500 industriaj entreprenoj kun komuna jara produktado,

valoranta 450 milionojn da latoj. 13,5% de tuta loĝantaro estas okupita en la industrio. Do, kvankam Latvujo restas ĉefe terkultura lando, la industrio ludas tamen gravan rolon en la ekonomia vivo de la ŝtato, kaj ĝia produktado atingas 24% de ĉiuj popolenspezoj.

La industrio laboras ne nur por la enlanda merkato, sed ankaŭ por eksporto. Jara eksporto atingas lasttempe 120 milionojn da latoj.

Oni eksportas ĉefe al Anglujo kaj Germanujo.

La plej gravaj industribranĉoj estas nutraĵa kaj frandaĵa, teksaĵa kaj metala.

De la evoluo de industrio dependas ankaŭ la kresko de la urboj. En 60 urboj de Latvujo loĝas 35% de tuta loĝantaro, La ĉefaj urboj estas Riga (385 mil.), Liepaja (57 mil.), Daugavpils (45 mil.) kaj Jelgava (34 mil.).

Dum la 20 jaroj de sendependa vivo forte kreskis ankaŭ la popolkulturo. 225 miloj de gelernantoj vizitas la popollernejojn. Por 1000 infanoj inter 5 kaj 14 jaroj estas en Latvujo 7,6 popollernejoj. Krome ekzistas 80 gimnazioj kun 15 miloj da gelernantoj kaj 1500 geinstrustoj. Latvan universitaton vizitas nun ĉ. 7000 gestudentoj. *Laŭ proporcia nombro de gestudentoj Latvujo okupas la unuan lokon en Eŭropo.*

En tuta lando ekzistas 790 bibliotekoj kun 2.500.000 da libroj; 75% da ili estiĝis en sendependa Latvujo. Tie ĉi gravon rolon ludas la Kultura Fondo. Lasttempe ĉiu-



jare aperas ĉ. 2000 apartaj libroj kun komuna eldonnombro de 3,5 milionoj ekz. *Ĉirilate Latvujo okupas la duan lokon en Eŭropo.*

La nombro de radiabonantoj superas 100.000.

La plej grava reprezentanto de latva spirita kulturo kaj literaturo estas *Janis Rainis* (m. 1929). Li estis ne nur la plej fama latva verkisto, sed ankaŭ batalanto por libereco de latva popolo kaj ĝia spirita gvidanto dum 30 jaroj.

Nunjare ĉiuj tri Baltaj ŝtatoj festis la dudekjaran jubileon de sia sendependiĝo. Ilia sorto kaj

vojo al libereco estis simila, kaj nun ĉiam pli kaj pli evidentiĝas, ke ilia estonteco estos komuna. Tio manifestiĝas ne nur en la sociaj aspiroj, sed ankaŭ politike en la Balta Konkordo. Tial ankaŭ naciaj festoj estas festataj en ĉiuj tri landoj. Do la 18-an de Novembro latva nacia flago flirtas en tuta Litovujo kaj Estonujo. Precipe ni, litovoj, kiujn ligas kun latvoj sanga kaj lingva parenceco, tutkore partoprenas en la ĝojo de frata latva popolo kaj deziras al ĝi prosperon kaj sunaĝon.

---

#### LATVA NACIA HIMNO

*Latvion benu Di,  
la benon donu Vi  
al la patruj' Latvi',  
ho, benu Vi ĝin..*

*Floras filina glor',  
kantas de l'filoj ĥor',  
nin gardu en favor'  
en latva land'.*

Trad. P. LAPIENĖ



*Riga, la ĉefurbo de Latvujo*





Monumento en Frata Tombejo

E. Erhards.

SILENTA PINVALETO.\*)  
(KLUSO PRIEŽU IELEJINA.)

Jen valet' en paca ĉarmo,  
Ĉirkaŭ pin' post pin' —  
Granda neĉesebla larmo  
Rosgutigas ĝin.

Kruco ĉe la krucapogo  
Staras en lini',  
Sube en la sabla togo  
Dormas la gvardi'.

Kiel ili en dangero,  
Kune en batal' —  
Same nun en Di-espero —  
Kune en la val'.

Animetojn enlulante  
Koniferoj zumas;  
Vundoj jam ne sangas vante,  
Eterneco lumas.

Paco... nur tombejaltaro  
Fajras kun ador' ;  
Vivu vi, subtera aro,  
Al martiroj glor' !

\*) De la tuta latva popolo tre adorata sanktejo — militistara tombejo apud Riga, kie ripozas falintoj pro libereco de Latvio kaj falintoj de unuaj 8 latvaj regimentoj de Latvu strelnieki, pro sia heroismo tiel jamaj dum mondmilito — komenco de latva armeo. Tombejloko, ĉarma de l' naturo mem, estas, krom tio ĉiam beligata de la ŝtato, admirata de la vizitantoj — eksterlandanoj. Ĝi estas konstanta temo por la kantoj.



J. Rainis

AL FRATOJ LITOVOJ.


Kiaj altaj montoj  
aŭ profundriveroj  
por ni baris rektan vojon  
al komuna viv'?

Nia ter' ebena,  
la riveroj sablaj, —  
nekomprenoj baris vojon  
al komuna viv'!

Same sentis koroj,  
samon diris pensoj,  
sama sango en la vejnoj  
vokis al kunviv'.

Fratoj niaj veraj,  
plej sub sun' proksimaj,  
ni transiru la barilon  
al komuna kort'

El latva P. L a p i e n ě



Latva verkisto J. Rainis

Karlis Skalbe

## LA FABELO PRI MUSETO.

Eble vi iam aŭdis rakonton pri museto, birdeto kaj kolbaso, kaj eble vi ekdezirus scii, kiel ili nun fartas.

Pri la birdeto mi nenion scias, ĉar mi vivas nun en la urbo kaj dum longa tempo mi ne renkontis ĝin. La kolbason eble iu manĝis dume. Sed kiam printempe ekfloras la malgrandaj bluj floretoj, kiuj per strange naiva mildeco plenigas ĉiujn arbarojn kaj valojn, mi rememoras la rakonton pri la museto.

Unu urso amis museton kaj vivis kun ĝi en sincera amikeco. La urso estis senmovema kaj maldiligenta. Ĝi kuŝis kaj revis pri mielaĵoj, kie pendis orumitaj abeloj. Sed la museto insiste kure-

tadis kaj bruetadis ĉirkaŭ la urso. La urso kuŝis kaj aŭskultis je ĝiaj paŝoj. La museto amasigis por si la fojnerojn, kaj kelkfoje ĝi petis ĝin: „Museto, gratetu al mi ĉi-tie subkole!“ aŭ „Rigardu tie, malantaŭ mia orelo!“ La urso ne povis satmiregi pri la diligenteco de la museto. Kiam ĝi nur unu fojon oscedis, ĝi tri fojojn ĉirkaŭkuris la branĉamason, en kiu kuŝis la urso.

Ĉe la tagmanĝo la urso permanege metis avenon en la buŝon, sed la museto sidis sur la malantaŭaj piedetoj, per blankaj dentoj deŝeliginte unu grajnon de aveno kaj manĝante nur la kernon.

„Tia agrabla infano,“ ĝojis la



urso kaj estis feliĉa, ke la muse-  
to manĝas ĉe ĝia tablo.

Kiam venis la vintro, la urso  
enfosiĝis en la branĉamason por la  
kuŝado kaj la museto lokiĝis en  
ĝia orelo.


„Mi nun ekdormos,“ diris ĝi, „se  
vi ion rimarkos do diru!“ Sed la  
museto flustris al ĝi mielajn fabe-  
lojn. Tiel ĝi dormis duonsonge,  
duonkonscie.

Printempe kuris en la arbaro

vere stranga vento. Kiel freneza  
ĝi skuis la abion, kvazaŭ volante  
ĝin vekti el la dormo, ŝirante la gla-  
ciigitajn pinglojn kaj disjetadis  
abifruktojn.

„Ĉu ĉi-tie io estas?“ konsternita  
la urso demandis.

„Jes, la pinglo-ŝiranto. Ĝi jetis  
al mi pinfrukton,“ diris la muse-  
to. Post momento urso ree ekmur-  
ris:



*Monumento de libereco en Riga*



„Museto, ĉu vi ion aŭdas?“ — Jes, jes, mi aŭdas la glacieron, kiu gutas de la arboj.

„Do baldaŭ mi devos leviĝi,“ ekĝemis la urso kaj turnis sin al alia flanko. Ĝi kuŝis, tiam ekmoviĝis kaj demandis:

„Museto, kio estas tiu bruoj?“

— La akvoj kantas, la glacio en la riveroj krakas. La printempo alvenis. Ĉe la ŝtumpo formikoj jam briletas!“

La urso leviĝis kaj ekbruis tiel, ke la birdoj en la pintoj de la arboj ektimis kaj klakis la flugilojn. Tiam ĝi amblis al la formikoj.

La neĝo degelis, kaj malrapide metante la piedojn sur la muskon, en la arbaron venis la kato. Ĝi rigardadis ĉion, kio sin movis, ĉiun defalintan branĉeton, ĉiun pasintjara folieton, kiun movigis la venteto. La kato estis ĉasisto kaj amis malgrandajn musetojn.

„Efektive ĝi amindumas al mi“ pensis la museto konfuzita de la

fajrega rigardo de la kato. „Kiom bela ĝi estas, kiom mildaj ĝiaj piedetoj, ne tiaj de mia urso. ... Kaj kiamaniere ĝi lavas sin, kaj kiel pura ĝi estas, ne kiel mia urso, ĉiam malpura de arba musko...“

Iun vesperon la museto diris: „Urseto, ĉu vi ne koleros? Mi dezirus iomete promeni. Tre bela estas la vespero!“ Sed malantaŭ la branĉamaso ĝin atendis la kato, etendinta sian voston.

„Iru, iru, — bonkore la urso diris, „nur venu baldaŭ!“

Sed la museto kiel iris—tiel foriris...

Nur la urso solece vagadis tra la arbaro kaj ploris: „Museto, mia malgranda museto“, ĝi eligis kaj forigis larmojn permanente. Kaj kie la larmoj falis, tie elkreskis mildaj bluj floretoj, je kiuj ankoraŭ nun estas plenaj la arbaroj.

El la latva tradukis Ho-Ko.

## ŜI.

Estis printempo, la tero aromis. La aero estis plena je la plej ebriga haladzo printempa.

Floris padusoj kaj siringoj. Printempis ne nur en la naturo, sed ankaŭ en la koroj junaj.

Mi estis feliĉa kaj sopiris je nenio pli. Ĉar mi amis per mia tuta koro, pasie kaj flame. Ĉu ŝi estis bela? Verdire, mi tion ne scias.

Sed per ia mistika forto ŝi ligis min al si, kaj ĉefe en ŝia apudesto mi estis kontenta, kiel homo soifinta post la trinko el la freŝa kaj kristala torento.

Sed feliĉo neniam daŭras eterne, ankaŭ la mia ne. Mi vekigis,

ĉar estis nur sonĝo en la nokto printempa, en la malliberejo.

Estis frua mateno, tra la krudkrucumita fenestro penetris ĉelen la radioj de la suno karesanta. Mi pasigis la tagon kvazaŭ ebria. Vane mi povis forviŝi el la memoro la noktan sonĝon, forgesi la knabinon, sed vane.

Alvenis vespero. Ekstere, en la urbo silentiĝis la bruoj, la simfonio de la laboro ĉiutaga. Sola mi staris ĉe fenestro rigardante trans la ĉirkaŭmuro eksteren. Tra la kradoj venis sonoj diversaj. Muziko — eble el la urba parko. Ekstere, malantaŭ la ĉirkaŭmuro, oni



ridis, distingigis eĉ voĉoj virinaj.

Sopirante je la reveno de la songknabino, nerveze kaj fibre mi atendis la nokton, sed neniam venis ŝi plu.

Pasis tagoj egalaj al semajnoj, monatoj kaj jaroj, malrapidaj kaj senesperaj... Grizaj, kiel la vojoj de mia patrujo, aŭtune per la koto kovritaj.

Ankoraŭ foje venis la printempo, portante por mi tiel longe sopiritan liberecon. La unuan vesperon, post jaroj longoj kaj seniluziigaj, mi ree eliris straten...

Mi renkontis belajn knabinojn kaj amidajn virinojn, sed ŝin mi ne trovis kaj ne povis forgesi — la knabinon el la nokta songo mallibereja.

Kvazaŭ lunatika mi vagadis en la lokoj plej ofte frenkventataj de

la homoj junaj. Miaj rigardoj serĉante kaj eslore traglitis multe da vizaĝoj belaj. Ofte al miaj rigardoj respondis instigaj kaj invitaj rigardoj kaj ridetoj. Sed mi neglektis ilin. Amikoj ofte miris pri mi, pri mia sintenado.

Poste mi provis forgesi ŝin, ebriigi, sed vane. En miaj ĉirkaŭprenoj kuŝis interesaj kaj agrablaj belulinoj, mi kisadis iliajn delikatajn ruĝajn lipojn, sed samtempe pensis pri ŝi, pri la netrovito.

Ĉiam, kiam ree venas la printempo, eĉ kiam oni ankoraŭ nur en la aero sentas la alvenon de ĝi, mi iras por renkonti ŝin, sed neniam renkontas, kvankam tutkore mi sopiras je ŝi.

Ree kaj ree mi iras, sed vane. Kie ŝi restas, kie...?

*Augusto Neselbergs, Latvujo*



*Latvaj  
naciāj kostumoj*



A. Ĉaks

## AL MIA AMIKO.

*Se Vi ĉagrenas, amiko,  
ne iru, —  
ne iru surmonten en la kafejon rondan,  
tie nur inoj sidas,  
kiuj je plej bona lipopomado,  
esencoj orientaj  
kaj cigaroj de iliaj amantoj odoras;  
tro bela tie estas la violonisto hebrea  
kaj la junuloj kelkaj  
dum horoj kaŭras ĉe unu kafotaso,  
ŝtelobservante la fraŭlinojn solecajn —  
ne iru!*

*Se Vi ĉagrenas, amiko,  
venu ĉe mi!*

*Kandelon mi metos  
en la balzamobotelon malplenan;  
brunetan pasjans — tabuleton  
(ĝin mi hieraŭ akiris)  
kaj glason da brando mi havas.  
Venu!*

*Submetos por Vi mi mantelon.  
La luno tra fenestro briletos.  
Kveretos kolomboj najbare.  
Por Vi mi fabele rakontos  
pri akvoj, ondoj kaj birdoj...  
Venu!*

*El latva tradukis Hugo Kaupmanis.*

## ESPERANTO - VIVO EN LITOVUJO

Al nia ano  
VYT. MAKNICKAS  
pro la morto de lia patro  
kondolencas LEA

Plej korajn gratulojn  
al nia membro  
s-ano P. MUREIKA kaj  
f-ino O. ŽUKAUSKAITĖ  
okaze de ilia geedziĝo.  
LEA

## ESTRARLABOROJ DE LEA

— La Estraro de LEA ĝis 1-a de Decembro kunsidis 10 fojojn; estis pri-traktitaj pli ol 50 demandoj.

— Estas akceptitaj jenaj novaj membroj: Ŝidlauskas Juozas (membronumero 104), Purtulis Juozas (105), Maknickas Vytautas (106).

—  
KAUNAS. En kultura klubo de Laborĉambro (Laisvės al. 26) estas aranĝita Esperanto — tablo, sur kiu estas metita verda flago kaj diversaj noyaj Esperanto — gazetoj. Tie oni povas legi esperantajn kaj litovajn gazetojn.



La klubo estas malfermita je 8-10 kaj 17-22. Geesperantistoj estas invitataj ĝin viziti multnombro.

KAUNAS. En „Mūsų Jaunimas“ (duonmonata revuo por demokrata junularo) regule aperas Esperanto — rubriko, en kiu estas Esperanto — lecionoj kaj kroniko el verda movado. La rubrikon gvidas s-ano Pr. Enskaitis.

KAUNAS. La Centra sidejo de LEA nun reorganizigis kaj akomodigis laŭ nova statuto. La ĉambro havas apartan tablon, skribmaŝinon kaj telefonon (Nr. 23792) por sia dispono. Dumtempe funkcias bona radioricevilo, ebliganta aŭskultadon de esperantlingvaj dissendoj de Eŭropaj stacioj. Estas perfekte bone aŭdeblaj dissendoj de Roma, Sofio, Parizo, Brno kaj Hilversum.

KAUNAS. La 20 de XI en la salono de Laborista Palaco okazis prelegoj pri Esperanto. Prelegis E. Medišauskas „Kio estas Esperanto“ kaj A. Poška „Esperanto en mia praktiko“. Ĉeestis ĉirkaŭ 200 personoj. La parolado estis akompanata per lumbildoj kaj koncertaj klarigoj.

KAUNAS. La 21 de XI komenciĝis la Esperanto kurso por komencantoj. Aliĝis 30 personoj. La kurson estras Pr. Enskaitis kaj instruas A. Poška. La kurso daŭros tri monatojn kaj lecionoj

okazadas ĉiulunde kaj ĉiujauĉe po du horoj.

KAUNAS. La membrokotizoj kaj abonoj de „Litova Stelo“ venas grandnombro. La aĉetado de libroj kaj petoj de diversaj informoj same montras, ke Esperanto movado en Litovujo estas sufiĉe vigla kaj promesa.

LITOVA — ESPERANTO VORTARO  
La kompilito de la Esperanto — Litova vortaro kaj poeto B. Giedra nun kompilas grandan *Litovan Esperantan vortaron*. Al li helpas aliaj esperantistoj.

La Litova — Esperanto - vortaro aperos en 1939.

#### LIBRO PRI LITOVUJO.

Tuj aperos esperantlingva libro pri Litovujo „Litovujo dum sia 20 jara sendependeca ekzistado“. kompilita kaj redaktita de M. Dušanski, diplom. juristo. La libro estos abunde ilustrita kaj enhavos historian skizon pri la Litova ŝtato, ĝeneralajn informojn pri Litovujo, artikolojn pri la eksterlanda politiko, agrikulturo, financoj, klerigo, ĵurnaloj kaj gazetoj, sporto, arto kt. pl. de Litovujo.

Eksterlandaj radioaŭskultantoj de „Nia Anguleto“ por interesaj raportoj ricevas donacojn. Skribu al: *Radiofonas. Esperanto, Kaunas, Litovujo.*

## El litova kultura vivo

### ANTANAS SMETONA PREZIDANTO DE LITOVA RESPUBLIKO

La 14-an de Novembro la Nacioj Re prezentantoj kvaran fojon reelektis Antanas Smetona kiel Prezidanto de Respubliko. Okaze de la reelektado la Prezidento ricevis multnombrajn salutojn de diversaj organizaĵoj kaj personoj.

Litova Esperanto — Asocio sendis jenan gratulelegramon:

„Al Sinjoro Ŝtatprezidanto.

Afabla kaj kara Gvidanto de la Nacio! Litova Esperanto — Asocio esprimas sian ĝojon kaj plejkore gratulas Vian Moŝton okaze de la elekto. La Esperantistoj de Litovujo, farantaj paŝan kaj kulturen laboron, alte taksas Vian senkomparan parsonecon kaj tiujn lumajn idealojn, kiuj Vin gvidas

dum direktado de nia Nacio laŭ vojoj de l'justeco.

Litova Esperanto — Asocio.

### LA JUBILEA KONGRESO DE LITOVAJ INĜENIEROJ KAJ ARĤITEKTOJ

La 24 de Novembro komenciĝis la jubilea kongreso de inĝenieroj kaj arĤitektoj. Ĝin honorigis per sia vizito la Ŝtatprezidento kaj la registaro. La kongreson salutis, krom multaj litovaj organizaĵoj, ankaŭ la latvaj kaj estonaj inĝenieraj kaj arĤitektaj asocioj.

La kongreso daŭris du tagojn kaj havis vastan kaj interesan tagordon. La asocio de litovaj inĝenieroj kaj arĤitektoj fondiĝis en Vilnius en Julio 1918. Kompreneble, la unuaj tagoj por la societo estis tre malfavoraj, ĉar tiam Vilnius ankoraŭ estis sub germana mi-



lita okupacio. La societeton fondis nur dekdu iniciatintoj, sed hodiaŭ la asocio havas jam 210 anojn.

Dum la kongreso klarigis, kiel progresis la tekniko en Litovujo. La transiro de ligna konstruado al brika rapide disvolviĝas. La fervojoj kaj ŝoseoj de jaro al jaro estas perfektigataj kaj konstruataj novaj. La industrio tre vastiĝis, kaj jam apartaj fakoj kontentigas ĉiujn postulojn.

Por ke oni pli klare povu vidi, kian progreson faris la litova tekniko dum la lastaj dudek jaroj, la inĝenieroj aranĝis ekspozicion kun plej vastaj klarigoj. La ekspozicio enhavis eksponaĵojn pri: teknika scienco, trafiko, vilaĝa kaj urba konstruado, industrio kaj metio. En la ekspozicio ankaŭ estis multe da diversaj diagramoj, modeloj, fotografaĵoj, skemoj kaj desegnoj. La ekspozicio havis grandan sukceson.

L.K.

La estinta dekanato de la fakultato por humanitaraj sciencoj ĉe la Universitato de Vytautas la Granda, profesoro de literaturo en la sama fakultato kaj fama litova verkisto Vincas Krėvė - Mikėvičius ricevis de la Latva Universitato titolon de „doctor honoris causa“.

#### 20 JARA SENDEPENDECJUBILEO DE LATVUJO EN KAUNAS

Jam fariĝis tradicio en Ĉebaltaj Ŝta-

toj komune festi la sendependectagojn.

20-jara jubileo de la Latva Sendependeco ĉijare, la 18-an de Novembro estis en Litovujo tre solene - festita.

Jam antaŭ la jubilea tago la sendito de Latvujo ministro Seja aranĝis akcepti kiun portoprenis la latvaj ministroj, speciale venintaj al Kaunas, la reprezentantoj de la litova registaro, la diplomatia korpuso kaj multaj aliaj gastoj.

Dum la festotago ĉiuj domoj estis dekoraciitaj per la latvaj kaj litovaj flagoj. Matene estis diservoj kaj vespere la solenaj kunsidoj.

La kunsidon en Universitato partoprenis la latvaj ministroj Berzinš kaj Seja kaj ankaŭ latvaj artistoj: pianisto Žilinskis kaj solistoj A. Pulcinš - Karps, A. Libert-Rebane kaj E. Mikelsons.

Plej solena kunsido okazis en la palaco de la oficiroj, kiun partoprenis la Ŝtataprezidanto A. Smetona, la latvaj ministroj, la litova registaro kaj multaj gastoj.

Okaze de la latva festotago la Ŝtata Teatro prezentis la teatraĵon „Indrani“ de la latva verkisto K. Blaumanis. Dum la prezentado de la opero „Aida“ la partion de Aida kantis la konata latva solistino Brechman-Štengel.

Loko

## Latva kroniko.

### LATVA KRONIKO. RIGA.

La 17. XI. 38. okazis malfermo de la vintra laborsezono en la nova ejo de Lat. ES. Post komuna kantado de „La Espero“. sekvis Viva gazeto kaj societaj ludoj.

La 17. XI. 38. sekretariino de Lat. ES. f-ino L. Jevsejeva, fariĝis rajtigita Cseh-metoda instruistino. Sukcesojn en por-esperanta laboro!

La 5. I. 39 Lat. ES. aranĝos Abivesperon ĉe Brivibas str. 15. Komenco je la 19-a h. En la programo: solkantoj, piannumeroj, deklamaĵoj kaj teatraĵo, Amorpoŝto, dancoj kaj reciproka pridono.

Enirpago: Ls. 1.- Ĉiuj estas afeble invitataj!

Dank' al klopodoj de loka delegito de I E L f-ino L. Jevsejeva, en ĉefurba gazetaro, de tempo al tempo, aperas notoj pri Esperanto.

Legemuloj! Kiu el vi deziras aboni „Litovan Stelon“ (Ls. 2 jare), „La Junan Vivon“ (Ls. 2, 40 jare) kaj „Lingvo — Libro“ (Ls. 0. 80 jare) sendu monon al L. Jevsejeva, Riga, Pasta kaste 844.

Kiu deziras aboni „La Praktiko“ (Ls. 6 jare), aŭ „Infanoj sur Tutmondo“ (Ls. 1 jare), sendu monon al F-ino J. Krievs, Riga, Pasta kaste 844.



## EL LATVA KULTURA VIVO.

DUDEK JAROJ.

(1918-1938)

Pasis 20 jaroj de post tiu neforgesebla Novembra tago, kiam de milita kaj revolucia uragano turmentita, sed spirite nerompita latva popolo deklaris al la tuta mondo ke de nun ĝi mem forĝos sian sorton en la sendependa kaj memstara Latvujo.

En malfacila batalo ni akiris nian ŝtaton, en senĉesa laboro kaj lukto ni devis ĉiujn 20 jarojn konstrui kaj defendi ĝin. La milito kaj la revolucio terure detruis nian landon, la popolo iĝis malriĉa kaj al ĝi minacis fizika kaj morala degenero.

Antaŭ ni staris preskaŭ nevenkeblaj malfacilaĵoj, kaj tamen ni restis venkin-toj en ĉiuj frontoj de la vivo.

Ankoraŭ pli, dum 20 jaroj ni kreis tian Latvujon, kiu nun en kultura kaj ekonomia bonstato estas inda okupi lokon apud iu ajn Eŭropa popolo.

Ni radikale ŝanĝis politikan, socian kaj ekonomian vizaĝon de nia lando, certiginte al la latva popolo la regantan kaj gvidantan rolon en ĉiuj filioj de nia vivo.

La latva lingvo fariĝis la reganta en nia lando, kaj al nia nacia kulturo nun malfermiĝis nelimigita vojo al evoluo.

Sennombraj estas niaj atingajoj kaj akiraĵoj, sed ni eĉ unu momenton ne rajtas ĉesigi nian laboron, por trankvile ripozi sur akiritaj laŭroj. Nian karan ŝtaton ni devas ne nur ĉiam defendi kaj subteni, sed ni devas fari el ĝi veran, luman, feliĉan kaj bonstatan landon. Tion ni atingos, se ni restos fidelaj al tiu unuiga spirito, kiun donis al ni la 15-a Majo kaj ĝia inicianto nia prezidanto D-ro K. Ulmanis.

„La unueco estas la plej granda forto de nia vivo, la unueco estas la ŝlosilo al la estonta bonstato kaj majesto,“ diras nia prezidanto. „Nia popolo divenis la sekreton de sia forto. La animo de nia popolo tra mallumaj jarcentoj rebrilis en pli nova kaj hela lumo. Nia popolo reakiris kredon al si mem kaj al sia estonteco, por kiu batalis kaj mortis niaj patroj kaj fratoj. Ni multon re-

akiris, sed la estonteco alportos ankoraŭ pli“.

Kaj tiuj pasintaj 20 jaroj, kiam estis multo atingita, kiam sur ruinoj kaj militaj postrestaĵoj estis konstruita nova vivo kaj starigita stabila fundamento por la ekzistado de nia popolo, estas certa garantiaĵo, ke ankaŭ pluen ni iros de venko al venko, renkonte al ĉiam pli granda bonstato kaj pli hela kaj glora estonteco.

Tion profetis al ni Kronvalds, Auseklis kaj Pumpurs. Al tio montras la vojon al ni nia Popolgvidanto D-ro K. Ulmanis, la fondinto kaj renoviginto de nia ŝtato.

*Judith Krievs.*

## LUDOLFS LIBERTS JUBILEAS.

Fankonata latva pentristo Ludolfs Liberts la 1-an de Oktobro rerigardis al 25-jara artlaboro.

Estas menciinda, ke la jubileanto estas multflanka novkreanto de latva kulturo.

Kvankam li estas okupata kiel respondeca gvidanto de la ŝtata Monpresejo, redaktoro, teatra dekoratoro kaj operreĝistro, li tamen sukcesas almenaŭ tri horojn dum la tago dediĉi sin al laboro per peniko.

Tio atestas pri lia granda arttalento kaj neelĉerpebla energio. Li estas vera majstro de lumo kaj ombro, en liaj bildoj dominas blankaj, sunaj koloroj. Proksima estas al li la sudo kun ĝiaj sunriĉaj ebenaĵoj; same alloga estas lia grandurba eterna rapidado. Li amas ankaŭ pejzaĝon de sia patrolando, kun ĝiaj verdaj arbaroj, bluaj rapidantaj riveroj, susurantaj ĝardenoj kaj de la suno orumitaj grenkampoj.

Alie griza kaj malriĉa antaŭurbo ricevas el lia interpreto la signifon kaj brilon.

Ankaŭ tie ĉi la ŝanĝiganta lumo kaj ludo de l'ombroj, kiuj estas sukcese kaptitaj, faras la arton viva.

La majstrecon de siaj koloroj li montras en siaj teatrodokorajoj. Al la artfantazio tie estas donita plena libero-ĉio moviĝas, ardas kaj brilas.



Fantazia teatro dekorajo kun riĉa ornamajo kaj virtuoza tekniko estas lia forta flanko. En tiu fako li ne havas konkuranton. La lertecon de sia dekoratora arto Liberts kun la sama sukceso scipovas apliki ĉie, ĉu li prezentas orientajn landojn, sunriĉan sudon, grizan nordon aŭ la pasintecon de la popolo, aŭ la kalejdoskopon de la moderna vivo. Ĉie regas lumo kaj ĝojo.

Li desegnis dekoraĵojn por pli ol 40 operoj, baletoj kaj operetoj. Centoj da bildoj estas pentritaj de li, kiuj nun troviĝas en ok eksterlandaj artmuzeoj kaj en kvar artmuzeoj de Latvujo. Tie oni povas trovi pejzaĝojn vivscenojn fantaziajn bildojn kaj ankaŭ portretojn de ŝtatestroj, sociagantoj kaj artistoj.

Ĉio estas farita kaj kolektita dum 25 jaroj. Ni deziru al li ĝisnunan vigecon kaj kuraĝon en lia laboro.

*Judith Krievs.*



Latva pentristo Ludolfs Liberts.  
(Kliŝajon afable disponigis la pentristo.)

## Internacia Esperanto - vivo.

### „INFORMOJ DE EAE“

#### JUBILEAS.

La gazeto „Informoj de Esperanto — Asocio de Estonio“ eldonis sian jubilean Oktobro — Novembran numeron. Aperis la 200/201 numero. Krom tio, la gazeto aperas jam 15 jarojn. Do, estas duobla jubileo. Ni gratulas la jubileulon kaj deziras, ke la „Informoj de Esperanto — Asocio de Estonio“ iru fidoplene al la 300-a.

### JUBILEO DE „HEROLDO DE ESPERANTO“.

La 20-an de Novembro aperis la 1000-a numero de „Heroldo de Esperanto“ kun verda titolo. Korajn gratulojn kaj bondezirojn!

#### ESPERANTO EN LA LERNEJOJ.

En Haag (Nederlando) okazis nacia kongreso pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, kiun organizis la oficejo „Esperanto ĉe la Instruado.“

La kongreso unuanime decidis peti la registaron kaj la parlamenton: 1) akcepti Esperanton inter la nedevigaj fakoj kaj 2) instrui Esperanton en la edukejoj por estontaj geinstruistoj.

La kongreson ĉeestis parlamentanoj, profesoroj kaj gravuloj el instrurondoj.

El 20 landoj venis 110 leteroj kun salutoj kaj bondeziroj.

### La 31-a Universala — Kongreso de Esperanto

okazas en Bern (Svislando) de la 29-a de Julio ĝis la 5-a de Aŭgusto 1939.

La kotizo ĝis 31. 12. 1938 estas 20, — svis. fr., ĝis 31. 3. 1939 — 25 sv. fr. kaj 31. 3. 1939. — 30 sv. fr. La edzo aŭ edzino de kongresano kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaroj pagas la duonon de la sumoj. Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpagan kongreskarton, sed iliaj aliĝoj estu aprobitaj de s-ro W. P. Merrick (kasisto de la Blindula Ligo), Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝilojn oni povas ricevi ĉe la kongresoficejo. Oficiala kongresa gazeto estas „Ni Vokas Vin.“

Adreso por leteroj: 31-a Universala Kongreso de Esperanto, Bern, Svislando.

Ĝis nun al la kongreso jam aliĝis 200 personoj.

**BULGARUJO.** En bulgarlingva gazeto „Zarja“ aperis artikolo pri la E. movado en Litovujo. La artikolon verkis s-ano Kostadin Haralampiev.



## TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

La redaktorino de „La Juna Vivo“, la monata gazeto por la junularo, iniciatis pasintan jaron kunvenon por infanoj esperantistoj kun bona sukceso. En aŭgusto de tiu ĉi jaro ŝi aranĝis similan kunvenon en Groet, Nederlando, en kiu partoprenis 200 infanoj el naŭ landoj. La kunveno sukcesis en tia grado, ke la konata esperanto pioniro Julius Glück nomis ĝin la tria grava okazo en la movado esperantista. La unua estis la apero de la lingvo, la dua, ke la homoj komprenis unu la alian en la unua Kongreso en Bulonjo apud Maro, kaj la tria estas, ke la infanoj en Groet, kunvenintaj sufiĉe grandnombre, kaj el naŭ diversaj landoj, ankaŭ bone komprenis unu la alian. Kaj ili ne nur povis komprenigi sin, sed ili ankaŭ libere parolis kaj ŝercis.

Ili havis tiom agrablan semajnon, ke oni decidis fondi Tutmondan Junular-Organizon, kies ĉefe tasko estas aranĝi ĉiujare Internacian Junularkunvenon kaj akceli la enkondukon de esperanto en la lernejoj.

S. ro H. Schut, instruisto en Koedyk, Nord-Holando, faris filmon pri la kunveno, kiu estas valora propagandilo.

Krom la belaj ĉirkaŭaĵoj de Groet oni vidas sur la filmo la infanaron dum ekskursoj, dancoj, teatraĵetoj, ktp. La prezentado daŭras 40 minutojn. Kopiojn de la filmo S. ro Schut jam forsendis al kelkaj landoj.

La nova organizo nomiĝas „Tutmonda Junular-Organizo“, ĝia organo estas „La Juna Vivo“, sekretario estas la desegnisto Floor Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Nederlando.

En aŭgusto de la jaro 1939 la Ĝenerala Kunveno de T.J.O. okazos en la ĉirkaŭaĵo de Brussel. Ĝi daŭros unu semajnon. Okazos dancoj, teatraĵetoj, ekskursoj, k. t. p. La partoprenontoj pagos entute sep guldenojn aŭ egalvaloron.

P. Kryt.

BELGUJO. En Antverpen okaze de la elektoj en la komunumo iu Frensen ĉekape de nepolitika listo de teknokratoj akiris neatenditan venkon super la partiaj listo kaj eniris la urbparlamenton kune kun 6 samlistanoj.

Gravan lokon en lia programo okupas

la enkonduko de Esperanto en la popolermejoj.

## ESPERANTO PROGRESAS EN FRANCUJO.

La gazeto „National — Zeitung“ en Basel (Svislando) sciigas, ke la franca ministro por klerigado subskribis la cirkuleran ordonon, laŭ kiu Esperanto estas enkondukata kiel nedeviga lernobjekto en ĉiuj francaj gimnazioj, teĥnikaj lernejoj, liceoj kaj instruistaj seminarioj. *Samtempe la ministro esprimis la deziron, ke ĉi rajton ekuzu laŭeble plejmulte da lernantoj.*

En la sekvanta numero la „National — Zeitung“ enpresis anoncon kun alvoko ellerni la internacian lingvon Esperanto, kiu, laŭ la gazeto, estas tre facila, logika, elasta, riĉa, tre belsona, kaj ĝuos la disvastigon en la tuta mondo kiel ideala rimedo de l' internaciaj interrilatoj kaj interproksimiĝo.

POLUJO. La 8-an de Novembro festis la Varsovia Esperantista Societo sian kvinjaran jubileon. La festenon ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj. Inter la salutintoj estis la filino de la Majstro doktorino Zofia Zamenhof. Post la paroladoj sekvis amuza parto.

Varsovia Esperanto - Societo laboras konstante kaj efike. Post la somera interrompo jam okazis en ĝi multaj prelegoj. Ĉe la societo funkcias konstanta biblioteko kaj gazetleĝejo. Ĝia adreso: Warszawa, Leszno 56/9.

HISPANUJO. Malgraŭ la terura milito en surmontara vilaĝo Castelltercol ĉe Barcelona kun 4.000 loĝantoj ekfloris esperantista grupo kun 85 anoj, kiu ankaŭ malfermis E. kurson.

BULGARIO. Laŭ dekreto de la ministro por komerco kaj industrio Esperanto estas instruata en ĉiuj komercaj kaj teknikaj lernejoj.

— En la bulgaran parlamenton estis lastatempe elektitaj tri deputitoj — esperantistoj, el kiuj unu ne antaŭ longe edziĝis je estona esperantistino.

HOLANDO. La firmao „Mario-Film“, kiu pretigas gravajn kulturajn kaj sciencajn filmojn, komencis uzi apud la holanda lingvo ankaŭ Esperanton.

## EKSTERLANDAJ ABONANTOJ,

Abonu „Litovan Stelon“ ĉe viaj poŝtoŝtupoj: tio kostos al vi kaj al ni malpli da peno kaj mono.



## Pago por junuloj.

### KVIN LONGUNGULOJ.

Vivis iam kvin fingroj: Grandfingro, Montrofingro, Mezfingro, Ringfingro kaj Malgrandfingro. Kvar estis grandaj kaj fortaj, nur la lasta, kvina, estis malgranda, tre malgranda.

Foje ĉiuj kvin estis tre malsataj. Grandfingro kunvokis ĉiujn kaj diris: „Serĉu ion por manĝi. Mi tiom volas manĝi, ke mi ne scias, kion fari.“

— „Jes, sed kion do ni manĝos?“ demandis Montrofingro.

La Mezfingro proponis: „Disrompu keston de la patrinjo, tie ni trovos diversajn dolĉaĵojn. Ho, tiam ni manĝos!“

— „Tio estus bone, sed tiu Malgrandfingro tuj ĉion babilos al patrinjo.“

— „Neniam mi diros. Se mi diros, tiam mi ne kresku plu kaj restu dum mia tuta vivo tia malgranda,“ diris Malgrandfingro kaj kruccsignis sin.

Kvar grandaj fingroj kredis je liaj vortoj kaj disrompis la keston de la patrino. Tie ili trovis flanojn kaj kukojn kaj tiom manĝegis, ke ili ne plu povis sin movi. Ili kuntiriĝis kaj ekdormis.

Kaj nun revenis la patrino. Ŝi vidis, kiel kvar grandaj fingroj en amaseto dolĉe dormis kaj sonĝis. Nur Malgrandfingro ne dormis kaj li ĉion babilis al patrino.

De tiam la kvina fingro ne plu kreskis, sed restis la plej malgranda el ĉiuj. De tiam kvar grandaj fingroj neniam plu povas manĝi, sed ili, eterne malsataj, kaptas ĉion, kion ili nur trovas.

Ellatvigis Olga Devenytė

### ŜERCOJ.

Ĉe la tablo.

Ĉe la tagmanĝo malgranda Joĉjo demandas:

— Panjo, ĉu mi povas ion diri!

— Oni ne devas paroli dum manĝado. Vi diros tion poste.

Baldaŭ finiĝis la tagmanĝo, kaj patrino demandas Joĉjen:

— Do kion vi, karuleto, volis diri?

— Mi volis diri, ke en via supo naĝis du muŝoj, — respondis la malgrandulo.

### Grandaj pensoj.

1) Vorto al tempo, silento al eterneco apartenas. M. Maeterlinck.

2) Mia amiko devas esti tutmonda amiko (Lessing.)

3) Nur tiu estas vera amiko, kiu restas amiko en malfeliĉo.

4) Saĝulo foje povus agi stulte, sed stultulo neniam estos prudenta. (Salanten.)

5) Justeco estas unika mono, kiu en tuta mondo estas akceptata (Ĉina proverbo).

6) Justa vojo — ĉiam plej longa.

7) Milito estas absoluta krimo (Van Blockland).

8) Ju pli malplena kapo, des pli multekosta ĉapo.

9) Pli multe da homoj mortas pro tromanĝado ol pro malsato.

10) Unu bona patrino anstataŭas cent instruistojn. (Herbart).

12) Plej certa signo de malbona ordo en urboj estas abundeco en ili de juristoj kaj de kuracistoj (Platon).

Trad. V. Sirtautas.

S. Ĉiurlionienė

### LA FELIĈA ESTAĴO.

La Ĉionpova Eternulo diris unu matenon: „Sufiĉos jam aŭskulti plendojn el ĉiuj flankoj! Jen, mi faros unu estaĵon feliĉa.“

Kaj rigardinte la mondon, Li alvokis blankan birdon, kiu malĝoje sidis sur branĉo, — ĉar ĝi konis nek neston, nek amikon, — kaj diris al ĝi:

— Mi deziras, ke vi estu feliĉa. Kion vi deziras?

— Ĉionpova Eternulo! — respondis la blanka birdo, — donu al mi fortajn flugilojn kaj permesu al mi flugi alte laŭ la vojo, kiun la suno iras.

— Bone, — diris la Eternulo, — kaj kion vi faras, atinginte la sunon?

— Ĉionpova Eternulo, — ree diris la blanka birdo, — permesu al mi flugi laŭ la vojo de la suno, ĉiam havi la sunon antaŭ la okuloj kaj... neniam la sunon atingi.

Tradukis M. D.



## La redakcio ricevis.

2 R. O. Esperanto — programo de mallongonda itala radiostacio en Romo. Jen nova venko de niaj italaj samideanoj.

Nepre subtenu iliajn klopodojn, petante senpage la programon de Radio Stacio „Esperanta Voĉo“, Via Montello, 5, Roma, Italujo

**STATISTIKA RESUMETO**, eldonita de la Nacia Instituto de Statistiko de Brazilo, Rio-de-Janeiro, 1938. Ricevebla de Brazila Ligo Esperantista, Praca da Republica, 54, Rio-de-Janeiro, Brazilo.

La resumo de la *Brazilia Statistika Jarlibro*, tradukita *Esperanten*, estas destinita por la diskonigado ĉiuloke, kie estas konata la internacia lingvo, pri la *nombra esprimo* de ĉio, kio povas karakterizi la brazilan nacion. Oni devas substreki, ke la statistiko publikigita en ĉi tiu „Resumeto“ prezentas tute novan trajton — ĝi enhavas la sistemigitan tutajon de la esencaj informoj pri la nacia vivo, t. e., la fizika, demografia, ekonomia, sociakultura, administraciakaj politiko situaciaj en la ŝtato.

La „Resumeto“ estas valora eldonaĵo por ĉiuj, kaj deziras scii pri Brazilo kaj ĝia nacio. Le esperantistaro ŝuldas dankon al la oficialaj institucioj de la Respubliko de la Unuigitaj Ŝtatoj de Brazilo, ke ĝi aplikas Esperanton, kaj devas gratuli la Brazilan Esperantistaron pro la atingita de ili sukceso.

**NI VOKAS VIN.** No 1. Bele eldonita kaj riĉe ilustrita Oficiala Kongreso — Gazeto de la 31-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta 29-a Julio-5-a Aŭgusto en Bern, Svislando. Havebla de LKK, Bundesgasse 18, Bern.

**SUPLEMENTO AL I.E.L. JARLIBRO 1938.** Enhavas aldonojn kaj ŝanĝojn en la delegitaro de I.E.L. kaj la raporton pri la 30-a U.K. de Esperanto en Londono.

**LYON'A INTERNACIO FOIRO.** Bela afiŝo kaj sorbpapero en Esperanto pri la foiro en Lyon, okazonta de 11 ĝis 21 de Marto 1939.

Oni anoncas ke ankaŭ la Katalogo de Ekspozantoj entenos rubrikojn en Esperanto, same kiel en Akcepta Servo por Eksterlandanoj estos esperantistoj. Oni sin turnu al Richard Levin. Estro de la Propagando, Foire de Lyon, Rue Ménéstrier, Lyon.

**LA INTERNACIA FAŝISMO DETRUAS LA ARTON DE HISPANIO.** Ricevebla ĉe Patronado Nacional del Turismo, Diagonal 556, Barcelona, Hispanujo. Prezo ne montrita.

Ĉi libreto estas dediĉita al la detrudo de l'arto. Plej multe suferis la urboj Guadalajaro. Madrido kaj Alkala de Henares, kie multaj artmonumentoj estis detruitaj. La broŝuro estas bele kaj zorge eldonita.

**„KANTONO SUB BOMBARDADO.“** Eldonis „Al la Nova Etapo“, Canton, P. O. Box. 116, Ĉinio. Prezo — 1 internacia respondkupono.

**„ĈINIO EN FLAMO“** Eldonis „Al la Nova Etapo“, Canton, P. O. Box. 116, Ĉinio. Prezo — respondkupono.

Ambaŭ libretoj — „Kantono sub bombardado“ kaj „Ĉinio en flamo“ per vortoj kaj bildoj montras scenojn pri la aktuala Ĉinio. Vi trovos ĉe la ĉinoj larmon, suferon, teruron, kaj ankaŭ lumon, entuziasmon, firmecon, aspiron je finvenko, sed nenian malesperon aŭ malkuraĝon...

La broŝuroj estas legindaj kaj rigardindaj.

Latinlingva verko „**KRITIKO**“ de prof. dr. *Francisko Erdey* (liberovendejoj: Marietti, Torino; Grilli, Budapest) enhavas Esperanto resumon.

Leidžia

Lietuvos Esperanto Sajunga

Red. *Petras Lapienė*

Žemaičių g.

Eldonas

Litova Esperanto Asocio

Red. *Petras Lapienė*

15 Kaunas, Litovujo



## ANONCOJ

La adreso de s-ano *E. Erchards* nun estas Jūrmalas iela 11, dz. 2, *Liepaja*, Latvujo.

Deziras korespondadi kun litovoj pri literaturo, artoj k.t.p. *Kostadin Haralampiev*, boul. „Nansen“ 41, *Sofia*, Bulgarija

Edv. Medišausko

„**ESPERANTO PAMOKU**“  
dar galima gauti  
„Spaudos Fondo“ kny-  
gynuose.

Baldaŭ aperos

Ivan H. Krestanov, L. K.

### TRA EUROPO PER ESPERANTO

Vojaĝnotoj kaj impresoj dum 33-jara esp. vivado. Ilustraĵoj sur ĉiuj paĝoj, grandformata, ampleksa, tre interesa verko en pure Zamenhofa lingvo. Por antaŭpagintoj ĝia prezo estas nur 1 dolaro aŭ egalvaloro, poste duoble pli multe.

Profitu la okazon, enskribu vin tuj. Tre allogaj estas precipe la ĉapitroj pri la bela nordo kaj amuzaj tiuj pri la baltikaj landoj.

Esp. Societoj kaj grupoj tuj abonigu sian bibliotekon, precipe tiuj, kie la aŭtoro senpage paroladis kaj propagandis.

Adresu ĉion al Ivan H. Krestanov, 6 Septemveri 2. *Sofia*, Bulgarujo

### INFORMILO,

oficiala monata organo de la Nederlanda

Esperanto — Gruparo

jara abonprezo: 1,50 guldenoj  
Adreso: *Jakob Telling, Schitbaan-  
laan 106-a. Rotterdam — C.  
Nederland*

Ni vivas la periodon de malamo, uzurpoj, trompoj kaj disiliuziĝo-doĝuste nun ni plej bezonas rondon de veraj, sinceraj kaj tutmondaj amikoj. Ilin ni povas akiri nur aliĝante al

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

Informojn donas A. Poška. *Kaunas*, *Laisvės* al. 36-13.

Litova samideano, kiu intencis retraduki mian Esperanto - litovan vortaron, estas petata sciigi al mi sian adreson, por preparoli la preparon kaj eldonon de litova - esperanta vortaro, kiu nun estas verkata de mi kun kelkaj aliaj samideanoj

*B. Giedra* (Šakiai).

### LABORISTOJ ESPERANTISTOJ,

Ni urĝe bezonas leterojn kaj artikolojn pri laborista vivo en eksterlando por litova laborista gazeto. Sendu fotojn kaj priskribon de via ĉiutaga vivo laboro, loĝejo, amuzoj kaj pasigo de libera tempo.

Por uzita materialo estos rekompencota.

Adresu: A. POŠKA, KAUNAS. LAISVĖS AL. 36—13.

„La Granda Familio“

Gazeto por la tutmonda esperantistaro

Multe da teksto, por malmulto da mono! Depost la 3-a n-ro LAGRAFA jam aperos dufoje en la monato, eble baldaŭ semajne! Aboneprezo: fl. 1,50 por 12 numeroj, aŭ 12 intern. resp. kuponoj  
Adreso: LAGRAFA, Groesbeek apud Nimego, (Nederland).



## *Esperanto libroservoj, eldonistoj kaj vendistoj*

Litova Esperanto - Asocio vendas kaj interesanĝas je viaj  
eldonaĵoj jenajn librojn:

	Prezoj en usonaj cendoj
B. Giedra <b>VIOLETOJ</b> , versaĵaro, 64 pĝ. ....	25 c.
K.R. <b>LA REĜO JUDEA</b> (trad. V.Devjatnin), 182 pĝ.bind.,	35 c.
P. Lapiené <b>EL LITOVA POEZIO</b> , 198 pĝ. ....	50 c.
sur pli bona papero .....	75 c.
Dimitriev — Medem <b>LERNOLIBRO POR RUSOJ</b> , 48 pĝ.	5 c.
Dimitriev <b>PLENA RADIKARO ESPERANTO — RUSA</b> , 140 pĝ. ....	20 c.
B. Giedra <b>PLENA ESPERANTO — LITOVA VORTARO</b> , 192 pĝ. ....	50 c.
bindita .....	70 c.

Mendojn aŭ proponojn pri la bazo de interesanĝo kaj liston de  
interesanĝotaj libroj bonvolu sendi al **LITOVA ESPERANTO —  
ASOCIO**, Žemaičių 15, Kaunas, Litovujo.

## *Jam aperis* **Violetoj**

50 elektitaj versoj pri amo, paco kaj homara kon-  
kordo.

Tradukis kaj kompilis B. Giedra laŭ eksterlandaj kaj  
litovaj klasikaj poetoj.

Libreto 64 paĝa. Prezo — 1,25 ld. aŭ 0,25 dol.

Ricevebla en Spaudos Fondas (Kaunas)

kaj ĉe kompilinto (B. Giedra, Šakiai, Litovujo).